Mèng Hàorán,

# Somera vespero

*tradukita de Manfred Retzlaff*

*Somertage en Nanting mi sopiras al Xinda*

De l' montoj ora lumo nun
foriĝas en vespera pac'.
Ekestas trema bild' de l' lun'
sur de l' lageto la surfac'.
Kun loza kap-hararo mi
sur la teraso kuŝas nun,
kvietas mia vivo, ĝi
sin donas al la lum' de l' lun'.
Flariĝas melilot-odor',
ĝi lante supreniĝas al
la dom' dum la vespera hor',
susuras jen ros-guto-fal'.

*Traduko de la ĉina poemo "Shān guāng" de* Mèng Hàorán *(∗689 – †740) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04).*

*Arg-995-2008 (2014-04-21 20:09:05)*

*Mi, Manfred Retzlaff, espernantigis la poemon laŭ la germanigo, kiun verkis la germana poeto Manfred Hausmann. Pri tiu vidu la retejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Manfred_Hausmann`*. La subtitolo "Somertage en Nanting mi sopiras al Xinda" signifas, ke la poeto, sidante en la suda pavilo "Nanting", sopiras je sia amiko Xinda.*

Mèng Hàorán,

# The glow on western mountains

*tradukita de N. N. 81*

The glow on western mountains quickly sets,
The moon is climbing over the eastern lake.
My hair loose, I enjoy the evening cool,
I lie in peace before the open window.
The wind spreads lotus scent all through the air,
The sound of dripping bamboo dew is clear.
Although I'd like to fetch my qin and play,
To my regret, there is no-one to hear.
So touched by this, I think of my old friend,
Throughout the night, I'm troubled by my dreams.

*Traduko de la ĉina poemo "Shān guāng" de* Mèng Hàorán *(∗689 – †740) en la Anglan de N. N. 81.*

*Arg-995-2010 (2014-04-20 00:35:06)*

*Tiu ĉi laŭsenca angligo troviĝas en* `http://www.chinese-poems.com/m6.html`*.*